Granda Paruo

Granda paruo (*Parus major*) estas paseroforma birdo en la familio Paruedoj. Ĝi estas loĝanta birdo kaj plej parto el ili ne migras.

Estas tre facile rekonebla birdospecio kaj krome maltimida, do facile rigardebla. Nigra kapo kaj kolo, blankaj vangoj kaj orelkovriloj, flavaj subaj partoj kun nigra streko tre kontrasta ĉe flavo de la gorĝo al la ventro, olivverda dorso. Ĉe virbirdoj la ventra streko estas pli larĝa. Ili havas blankajn flugilstrion kaj eksterajn vostoplumojn. Ĉe junuloj nigro estas anstataŭata de bruna kaj blanka de flava.

La specio vivas en tuta Eŭropo, escepte en Islando kaj norda Skandinavio, nordokcidenta Afriko, tio estas norda Maroko kaj Alĝerio kaj moderklimata Azio, de Turkio kaj Mezoriento ĝis plej parto de Ĉinio, Koreio kaj Japanio, dua populacio el Irano al norda Barato kaj Sudorienta Azio kaj Indonezio ĝis Borneo, dum alia populacio loĝas en suda Barato. Estas la plej granda kaj la plej ofta el la paruedoj en tiuj landoj.

La prefera medio por tiu birdo estas parko, tio estas mezarbaraj pejzaĝoj, ĝardenoj, heĝsemitaj kamparoj. La homa aktiveco ne ĝenas ĝin, kaj oni povas vidi grandan paruon ĝis urba centro, se tie ĝi trovas sufiĉe kavojn por nesti kaj arbojn por sin nutri.

En la dua mezo de aprilo la granda paruo demetas de ses ĝis dekdu (sed plej ofte 7 aŭ 8) ovojn blankajn kun ruĝaj punktoj, kiujn la ino sola kovos dum du semajnoj. Foje grandaj ovodemetadoj estas tasko de du inoj. Ĝi nestas en arbaj kavoj sed ankaŭ en artefaritaj nestejoj (nestoskatoloj), muroj, rokfendoj kaj tiel plu. En la okazo, truo de nestejo devas esti ronda, kaj vasta ĝuste 32 mm.

La idoj malkutime inter birdoj havas plumaron kun koloroj similaj al plenkreskuloj pro la karotenoido. La nuko estas flava kaj allogas la atenton de la gepatroj per ultraviola reflektado. Tiu makuleto blankiĝas post la unua mudo je aĝo de du monatoj, kaj malpliiĝas poste.

La nutraĵo estas tre varia, ĝi manĝas ĉiujn specojn de insektoj, araneoj, vermoj, al kiuj ĝi aldonas dum vintro semojn, berojn kaj fruktojn. Ĝi estas ofta vizitanto de birdaj nutrejoj dum vintro.

La Granda paruo estas ĉefe insektovoruloj. Ili preferas proteinriĉajn raŭpojn dum la reprodukta sezono por manĝigi sian idaron. Studo publikita en 2007 pruvis, ke la Granda paruo helpas malpliigi la damaĝon fare de raŭpoj en pomĝardenoj je 50 %. En Anglio, Grandaj paruoj lernis rompi la ŝtopkovrilojn de la boteloj de lakto liveritajn ĉe hejmoj por atingi la flosantan kremon supre.

Ĝi estas, kiel aliaj paruoj, kantobirdo, kaj havas grandan varion de alvokoj, el kiuj la plej familiara estas io kio sonas al angloparolantoj kiel “tiĉa, tiĉa”, ankaŭ kvazaŭ knaranta ĉarumo. En la Unua Movo de la simfonio de Anton Bruckner nome 4a Simfonio oni aŭdas kelkajn kantojn de Granda paruo kune en tre realisma maniero. Interese, la Grandaj paruoj Great de la du sudaziaj grupoj de rasoj ne rekonas la alvokojn de la moderklimataj Grandaj paruoj, kaj eble ili devus esti separata specio.

Retpaĝo: www.traduki.de

Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Granda_paruo